

FOLKLORO

En Nederlando la Cikonio estas konata kiel la birdo, kiu feliĉigas geedzojn per ĵus naskitaj idoj. Ankoraŭ okazas, ke junaj gepatroj anoncas la naskiĝon de infano per malgrandformata karteto, ilustrita per cikonio alportanta novnaskiton.

En la estinto oni kredigis al infanoj, ke estas la cikonioj, kiuj alportas la gefratojn. Alia rakonto por tre junaj infanoj estas, ke infanoj kreskas en brasiko. El hispana gazeto „Boletín” mi rimarkis, ke ankaŭ en Hispanio la cikonio estas simbolo de infandonacanto. Tre verŝajne en pluraj landoj ekzistas la sama kutimo.

Se jes, estus interese tion ekscii kaj cetero, kiaj alispecaj kutimoj rilate al naskiĝ-anoncoj estas en diversaj landoj. Volonte mi aŭdos tion ĉu rekte al mia adreso ĉu pere de la redakcio. Tiam ni en sekvonta gazeto informos pri la ricevitaj sciigoj.

Estas dezirinde aldoni specon de anoncilo, laŭ la kutimo en via lando aŭ (kaj) gazeto: anonco kun aldona traduko en esperanto. Ankaŭ mi volonte ricevos informojn pri tiuspecaj anoncoj kaj anonciloj, kiuj rilatas al gefianĉiĝo, geedziĝoj, geedzaj jubileoj kaj okaze de morto.

En Nederlando estas kutimo, ke gefianĉoj anoncas la oficialecon de fianĉiĝo per duobla karto, kies ambaŭ duonoj surhavas la informon kun la dato kaj horoj de la interfamilia festa kunesto, kie oni akceptos konatulojn, krom sur unu flanko la nomo de la knabino kaj je la alia de la junulo. Ofte oni anoncas krome aŭ nur en ĵurnalo(j).

Same okazas ĉe geedziĝo. Tamen en la nuna tempo oni sekvas kutimon el ne-laboristaj rondoj, ke la gepatroj anoncas sur (pli grandformata ol ĉe gefianĉiĝo) la unua duono de karto, la intencon de sia filino al edziniĝo kaj sur la dua faras la gepatroj de la filo. Unue la gefianĉoj persone oficiale anoncas sian intencon ĉe la urba sekretario. Sur ekstera muro de la urbdomo aperas la edziĝ-intenco kaj tiel ĝi fariĝas publika, por ke eventuale oni povu konstati laŭlegan nenormalaĵon. Post du aŭ tri semajnoj povas okazi la oficiala geedziĝo en la urbdomo. Eventuala eklezia konfirmo en preĝejo povas okazi nur post la publika oficialiĝo.

Geedza jubileo post 12½, 25, 40 aŭ 50 aŭ pli da jaroj ofte estas anoncata en ĵurnalo aŭ gazeto, fare de la infanoj aŭ proksimaj parencoj. Ĉe morto aperas ofte anonco en gazeto (ĵurnalo), kiu estas plej multe legata en la rondo, kie la mortinto estis konata. Tamen preskaŭ ĉiam la anonco okazas per cirkulero kunfaldita kaj kun

nigra kadro. Ĝi enhavas krom la mortanonco kaj kelkaj enkondukaj linioj aŭ vortoj pri la meritoj, eventuale pri la subita aŭ post longa sufero, morto, la daton kaj horon de la entombigo aŭ cindrigo.

Pri ceteraj kutimoj estintaj kaj nunaj eble estas pli konvene verki artikolon, post kiam mi rimarkas interesiĝon pri tiaj „folkloraroj” inter nia legantaro. Cetere... ĉe ricevo de sufiĉe multe da „anonciloj” supre menciitaj, ili taŭgas por ekspozicia materialo favore al propagando por esperanto.

H. W. Alings,
Middenweg 226, Amsterdam O.



LIBERPENSULA ANGULO

Libereco kaj religio.

Multaj pensas, ke la kontraŭreligia agado de la liberpensuloj, ateistoj, estas unu el la multnombraj aspektoj de la netoleremo. Tion pensante ili grave eraras. La liberpensuloj celas emancipi la homojn, k pro tio ili alvokas ilin cerbumi, pensi.

La eklezioj malpermesas al la homoj cerbumi. La filoj de la proletoj devas nur kredi... k laboregi. Ĉu estas netoleremo kontraŭbatali tiajn fihomojn, tiajn netoleremulojn? En Francio, ni travivas nun infanan tragedion. La pastroj forrabis du judajn infanojn. Ili spitis la leĝon, mokis la registaron k forsendis la du infanojn en Hispanio. Fine ĉi tiuj revenis en Francion, sed ni ne pensas, ke tie finiĝas la Finaly-afero. Komitato starigis por postuli la revenon de tiuj malfeliĉaj infanoj; ĝi devas daŭrigi la batalon, por ke la infanoj povu elekti mem, poste, sian religion aŭ filozofion. Unue, la Finaly-infanoj devas esti redonataj al sia vera familio.

Sed tiu bedaŭrinda fakto montras al ni, ke la liberpensantaj homoj devas vigle kontraŭbatali la ekleziojn, ĉar tiuj lastaj estas vere netoleremaj, infanrabistoj! Ĉie, kie ni ne vigle kontraŭstaras, la eklezioj pli k pli postulas.

Jam estas tempo, ke la liberpensuloj en la mondo agadu. Inter aliaj, la kontraŭklerika temperamento de la francoj devas vekigi. La gepatroj ne devas permesi, ke oni trudu iun ajn dogmon al iliaj infanoj.

La klerikismo estas, pli ol iam, la malamiko de la Libera Penso k de la Demokratio.

Andreo GAY (21428)

P.S. — Ni sciigas al niaj amikoj scipovantaj la francan lingvon, ke la Pensolibereco parolas ĉe la franca radiofonio, „nacia ĉeno”, la duan dimanĉon ĉiumonate, je la 9.15 matene.

SAT venku la Krizon!

Ni kvitancas kun danko jenajn donacojn:

— en Parizo: (ff.) M. Bodereau 200, Cuny 150, Bulcourt 300 (sume: 650 ff., kun antaŭaj listoj: ff. 99.650).

— en Stokholmo: (sv.kr.) Karlson-Borås 2, Anderson-Borås 2, Fridén 1 (= 5 skr., kun antaŭaj listoj: 920,20 skr.).

— en Buenos-Aires: (arg.pes.) Luke 5, Zambrano 5 (sume 10 pes., kun antaŭaj listoj: 132,40 pes.).



Antologio de Brazilaj Rakontoj. Eld. Brazilia Esperanto-Ligo, Praça da Republica 54, 1o, Rio da Janeiro. 310 paĝoj. Form. 14 x 19 cm. Prezo: 2 us. dol.

Grava kolekto da rakontoj (33 laŭ nombro, faritaj de 33 diversaj tradukintoj), kies aperon morale apogis la Brazilia Beletristika Akademio, — tio signifas ne subtakindan sukceson por esperanto: la esp-istoj, kiuj legos kun ĝuo tiun ĉi antologion, agos bone, sendante gratuleton al „Academia Brasileira de Letras”, Av. Presidente Wilson 203, Rio, kiu baptostariĝas ĉe tiu ĉi libro.

Ni konatiĝas kun multnombro da nuntempaj novelistoj tiulandaj; tre diversstema k diverskolora estas la aspekto de tiuj rakontoj; plej ofte ili traktas am-aferojn, familiajn malharmoniojn, seniluziigojn, sed iuj ankaŭ estas tre amuzaj, gajaj; kelkaj apenaŭ transpasas la kadron de anekdoto. Sed ĉiuj ŝajnas al mi legindaj, kvankam ili malsam-valoras.

Ankaŭ la tradukoj ne estas egalvaloraj: kelkaj estas stile k lingve treege bonaj, rimarkindaj, aliaj montras lingvajn mankojn, kiujn lerta kontrolanto facile estus elimininta. Tiuj kvalit-diferenco estas tre frapa k... en dua eldono nepre forigota. Ŝajnas, ke mankis tempo por labori la laborojn. Ankaŭ la grafika prezento estas iom nezure, rapideme farita. Tamen en sia tuto la verko estas plene rekomendinda k trovos plaĉon eĉ ĉe pretendemaj legantoj.

N.B.

J. H. Sullivan: *La Junaj Detektivoj*. Ilustraĵoj de B. Goodwin, Eld. The Esperanto Publishing Co. Ltd., Chorleywood, Herts. 44 pĝ. Form. 12 x 18 cm. Prezo: 2 ŝil. (100 fr.fr.). Havebla ĉe SAT.

Rakonto pri kontrabandistoj, kiu povas interesi infanojn 12-15-jarajn. Edukan valoron tia rakonto ne havas, sed distran, k ĝi sendube plenumos sian celon en la manoj de junaj s-lingvanoj, kiuj ĝojos trovi libreton konforman al ilia aĝo k gusto.

Faktoj pri Norvegujo. 64 paĝoj. Form. 11,5 x 16,5 cm. Prezo nkr. 3.50 (ŝil. 3/6) plus af franko. Eld. Esperanto A/S, Box 942, Oslo.

La libro aperis jam en pluraj lingvoj kiel informbroŝuro pri tiu skandinava lando; ĝi estas eldonita de Chr. Skibstads Forlag k la plej granda norvega ĵurnalo „Aftenposten”, kunlaboro kun Norvega Esp. Ligo. Oni trovas multajn konkretajn informojn en tiu libro.

El Japana Lando k Popolo. Skribita de Japanaj Infanoj. Infanfako de Redakcio en Heibon-sha, No. 4, Yomban-tyo (Kozimati). Tiyo-da-ku, Tokio, eldonis varbbroŝuron ilustritan, kun verkaĵoj de infanoj, vokante „kunlaboro (verkoj faritaj de infanoj aŭ por infanoj: ŝataj kantoj, rakontoj ktp., priskriboj pri infana vivo) en la tuta mondo. Cel: eldono de libro „Infanoj en la Mondo” (unue japane, poste esperante). Prezo de l' broŝuro 20-paĝa, form. 17,5 x 20,5 cm: 35 fr.fr. (0.10 dol.).

S. E. Schmalzriedt: *Sinjos Sprung über die Grenzpfähle* (Sinjo transsaltas la limbarojn). 192 pĝ. Prezo: gmk. 6.50 Eld. Veitsburg-Verlag, Ravensburg, Germ.

Kia infana ĝojo, kia freŝeco en tiu libro de la 15-jara lernantino, kiu travojaĝis Eŭropon per esperanto! Kaj kia ĉiupaĝa propagando por esperanto mem! Certe tiu demonstro pri la interfratiga rolo de nia movado havas pli multe da verba valoro ol iu ajn flugfolio aŭ broŝuro laŭdanta la avantaĝojn de esp-o. Jen esperanto je la servo de la praktiko! Ankaŭ SAT havas laŭdindan lokon en tiu ĉi germanlingva libro.

Disvastigu la ilustritan koloran poŝtkarton kun alegorio de SAT

10 ekz-oj kostas 0.22 dol. (80 fr. fr.)

Ĉu vi jam akiris

HISTORIO DE SAT 1921-1952

Ankaŭ vin povas interesi la enhavo de tiu dokumentriĉa libro, kiu pentras genezon k disvolviĝon de SAT. 152 pĝ. Formato 14 x 19 cm.

Prezo: 1,30 dol.